

Fenikso

Revujo de Esperanto Nederland

26a jarkolekto • n-ro 2 | marto - aprilo 2021

Marc Konijnenberg retiriĝas
kiel komitatano A

Lingvomodelo prognozas
virusevoluon

La nova POMEKO
komparita kun antaŭaj eldonoj

Jos Wichmann bringas
Esperanto sub la atento
de radiolovlisteristoj

10 Helpantoj serĉataj

22 Sur unu paĝo 1100
bitlibroj kolektitaj

16 Aangeboden
Esperantozegels

Jarraporto 2020
de "Evidente" 6

13 Bijna-ramp op
Westerschelde

Fenikso, Forumo de Esperanto Nederland

Dumonata membrogazeto de Esperanto Nederland
ISSN 1384-6515

Membroj de Esperanto Nederland ricevas la gazeton.
La jara kotizo estas € 35,-
(por samdomanoj €12,50).
NEJ-anoj pagas € 15,-
(por samdomanoj € 5,-).

Fenikso estas aparte abonebla nur por ne-membroj en eksterlando.

La tarifo estas € 20,-.

Vidhandikapitoj povas ricevi kasedan version de Rob Moerbeek, vidu dekstre.

Kunlaborantoj de Fenikso:

Ĉefredaktoro: Foppe-Klaas Hovinga

Redaktoro: Andries Hovinga

Korektantoj: Marc Konijnenberg kaj Bert de Wit

Konsilanto: Ineke Emmelkamp

✉ Redakcio@esperanto-nederland.nl

Limdato:

Materialo por la sekva numero estas bonvena ĝis la 1-a de aprilo 2021.

Informoj pri Esperanto:

Ineke Emmelkamp

Arubastraat 12, 9715 RW Groningen

info@esperanto-nederland.nl

tel.050-5718842

Studie-weekeinde:

studosemajnfino@esperanto-nederland.nl.

Esperanto Nederland enrete:

Retejo: <https://www.esperanto-nederland.nl>

Fejsbuko: facebook.com/esperanto.nederland

Telegramo: <https://t.me/EsperantoNederland>

Tvitero: <https://twitter.com/esperanton>

Sendu viajn respondojn al:

redakcio@esperanto-nederland.nl

Respondu al artikoloj per maksimume 200 vortoj.

La redakcio decidas ĉu publikigi tekstojn aŭ ne.

Estraro

- **Estraro:** estraro@esperanto-nederland.nl

- **Prezidanto:** vakas,
(prezidanto@esperanto-nederland.nl)

- **Sekretario:** Ineke Emmelkamp,
Arubastraat 12, 9715 RW, Groningen
(sekretario@esperanto-nederland.nl)

- **Kasisto:** Loes Demmendaal,
Duikerlaan 160, 2903 AC,
Capelle a/d IJssel.
(kasisto@esperanto-nederland.nl)
tel.010 2133320

- **Estrarano:** (i.a. pri instruaj aferoj):
Rob Moerbeek,
Zwaansmeerstraat 48, 1946 AE, Beverwijk.
(rob.moerbeek@esperanto-nederland.nl)
tel.0251 231079

- **Estrarano:** Andries Hovinga,
De Fennen 47, 8918 CC,
Leeuwarden, tel.06 28916262
(andries.hovinga@esperanto-nederland.nl)

- **Pri sociaj komunikiloj:**
(sociaj-komunikiloj@esperanto-nederland.nl)

- **Membro-administranto:**
Koos Scharroo,
Vaartweg 24G, 8382 EB, Frederiksoord
(membroj@esperanto-nederland.nl)
tel.06 22413267

Bv. informi pri (ŝanĝoj de) poŝtadreso,
telefonnumero, retroŝtadreso, (eks- kaj
ali)membraĝo, pagmaniero

Bankkonto:

IBAN: NL 10 TRIO 0786 8441 67

nome de Esperanto Nederland,

Capelle aan den IJssel.

Eventueel retouradres:

Esperanto Nederland Ledenadministratie

Vaartweg 24G

8382 EB Frederiksoord

En tiu ĉi numero

4. De la Estraro
5. Bonvenon, novaj membroj
6. Stichting Zienderogen (Evidente)
7. Mallongaĵoj
8. Portreto de esperantisto Jos Wichmann
10. Vakantaĵoj
12. S-ro Frans Timmermans uzas la anglan lingvon
13. Taal oorzaak van bijna-ramp op Westerschelde
14. Engels ongewenst, Lingvomodelo prognozas virusevoluon
15. Martin Ptasinski pri la Soroba lingvo
16. Reklamo
17. Revuo-interŝanĝo
18. Felietono, Roterdamo 2020
19. Vortserĉenigmo
20. Miksaĵoj
21. Letero de Marko Konijnenberg pri sia retiriĝo kiel komitatano A
22. An Olijslagers, kial mi havas 1100 bitlibrojn
23. POMEKO – Nova Rikolto
24. Malfacilas enkonduki interlingvistikon per manlibro
25. Koninklijke Bibliotheek (KB), Esperanto en scienco
26. Senpagaj libroj
27. INK-konkurso
28. Esperanto Studieweekend

Amsterdama Rondo

“La Amsterdama Rondo” organizas kunvenojn de esperantistoj - ĉiun duan dimanĉon en la monato. Nun ni renkontiĝas virtuale. Ĉiuj estas bonvenaj.

Organizanto:

laamsterdamarondo@gmail.com. +31 614 240 870 (Peter) +31 23 5242 643 (Bert)
Vidu: <http://amsterdamo.nl>

Antaŭparolo

Een oproep: “We are sinking, we are sinking!” - De nieuwe medewerker van de Duitse kustwacht aan de marifoon reageert in steenkolenengels: “What are you thinking about?” Aan die reclame van Berlitz taalschool moest ik denken toen ik het artikel van Simon Smits ontving over de bijna-ramp met een cruiseschip op de Westerschelde. Wanneer mensen elkaar niet goed kunnen verstaan, kan dat grote gevolgen hebben. In dit voorbeeld zouden de gevolgen direct optreden. Vaak zijn de gevolgen minder direct, maar desalniettemin wel ernstig. Bijvoorbeeld wanneer bewoners van een land of tussen landen van elkaar vervreemden.

Men kan denken dat Engels de oplossing is. Europarlementariër Frans Timmermans gebruikt die taal tijdens toespraken. Simon Smits sprak hem er in een brief op aan en kreeg een reactie terug van de *Communication advisor* (!). Wellicht kunnen we bij Simon Smits ideeën aandragen voor een tegenreactie.

Op diverse manieren kunnen we het gebruik van Esperanto aanmoedigen. Anneke Schouten-Buijs heeft een bordje bij de huisdeur hangen. Scivolemo maakt wetenschappelijke video's en webpagina's in het Esperanto. An Olijslagers heeft een volle webpagina met Esperanto e-boeken verzameld. Het maakt Esperanto leuk en relevant. – Lees je liever boeken op papier, voel je dan vrij een boek van Senpaga op te vragen. Fijn als boeken weer een nieuwe bestemming krijgen.

Het bestuur zoekt leden die mee willen helpen. Kijk daarom eens tussen de vacatures of er iets is wat jou leuk lijkt om te doen. Jos Wichmann toont ons dat een handicap geen belemmering hoeft te zijn om actief met Esperanto bezig te zijn. Ik ben eigenlijk wel erg benieuwd naar reacties uit jouw omgeving en wat jij antwoordt wanneer je vragen uit je omgeving krijgt.

Vanwege de pandemie wordt Fenikso rechtstreeks vanuit België verzonden, waar het gedrukt wordt.

Ni deziras al vi ĝuplenan legadon.
Foppe-Klaas Hovinga
Ĉefredaktoro

Foto sur la kovrilo

Jos Wichmann estas unu el la esperantistoj kiu celas antaŭenigi Esperanton. Kiam ajn estas ia kialo por fari tion, Jos telefonas al radiostacioj kaj parolas pri la lingvo en rekta elsendo. Kvankam tio ne estis ĉiam facila - por iu, kiu estas blinda, la iloj por lerni estis limigitaj - li lernis Esperanton kiam li estis juna. Vi povas legi la intervjuon kun Jos sur paĝo 8.

Karaj,

Jam la dua numero de Fenikso por 2021! Ni, la estraro, admiras Foppe-Klaas Hovinga ke li sukcesas kompili bonan kaj interesan gazeton. Ankaŭ la kontribuantojn ni dankas! Plej novaj membroj sendis siajn kontribuojn!

Koos Scharroo, kiu prizorgas la membro-administradon, sendis ĝojigan mesaĝon por la jarraporto. En la jaro 2020 ni ekhavis 18 novajn membrojn! Mi ne memoras ke ni iam havis tiom da novaj membroj en unu jaro. Kaj en januaro 2021 jam tri novaj aliĝoj!

Esperanto Nederland kaj 2021.

Kion ni faru dum la jaro 2021? Kion vi deziras fari? Certe estas ke la virtualaj kunvenoj de La Amsterdama Rondo okazos. Bert de Wit bonege gvidas ilin.

Pere de la retejo Evento Servo

<https://eventaservo.org/Reta> vi trovos interesajn kongresojn, babiladojn kaj kursojn. Se vi nokte ne povas bone dormi certe vi trovos kunvenon en Aŭstralio aŭ Kanado!

Sed kion Esperanto Nederland povas fari?

Wat zullen we gaan doen in 2021? Zeker is dat er allerlei virtuele bijeenkomsten zijn te volgen, zoals bijvoorbeeld de bijeenkomsten op de 2e zondag van de maand van de Amsterdama Rondo. Of één van de vele andere bijeenkomsten die je kunt vinden op de website Eventa Servo. Er zijn congressen en cursussen in alle delen van de wereld. Als je liever 's nachts iets volgt, geen probleem: er zijn bijeenkomsten in Australië of Canada! Maar wat kan Esperanto Nederland doen?

Heb jij een leuk idee of een vraag? Neem dan contact met mij op!

Adiaŭo de la prezidanto Said Baluĉi

Said Baluĉi decidis forlasi la estraron jam en majo 2020, sed pro la pandemio ne okazis jarkunveno. Nun li definitive ekŝiĝis ekde la 1a de januaro 2021. Pro la pandemio ni ne povis adiaŭi lin. Vendredon la 8-an de januaro en la Centra Oficejo de UEA nia eksprezidanto ricevis dankesprimon de Rob Moerbeek, nome de la estraro pro sia longa sindediĉo al nia landa asocio kiel ĝia prezidanto, malgraŭ sia granda okupateco, interalie en la Centra Oficejo, kie li plenumas gravan rolon, interalie kiel peranto por la ceteraj volontuloj. La donaco konsistis el librokupono, kiun kreis la libroservisto Lionel Onet, belforme kaj grandformate. Said ne deziris veran solenaĵon, do la tuto okazis sobre per simpla transdono kaj dankvortoj.



Komitatano A

En 2019 ni nomumis Marc Konijnenberg kiel komitatano A por UEA. Li aktive partoprenis la kunvenojn, ekzemple la komitatkunsidojn dum la Universala Kongreso en Lahti (Finnlando) kaj poste en la retaj kunvenoj. Ni tre aprezas lian bonan laboron. Komence de januaro Marc anoncis sian retiriĝon. Vidu por la kialoj lian leteron kiun vi povas legi sur paĝo 21. Marc plenumos la taskon ankoraŭ dum kelkaj monatoj, sed ni devas trovi anstataŭanton!

Kiu el vi interesiĝas pri tiu funkcio? Ĉu vi interesiĝas pri la laboro de UEA? Komitatkunsidoj okazos dum la Universala Kongreso. Ĉu vi planas ĉeesti Universalan Kongreson?

Pri la komitato vidu: <https://uea.org/asocio/komitato>.

Kotizo por 2021

La kasisto Loes Demmendaal deziras atentigi vin pri la pago de via kotizo por la asocio Esperanto Nederland. La kotizo estas € 35,-- jare. Samhejmano pagas € 12,50. NEJ membroj € 15,-- (samhejmano € 5,--).

Se vi rajtigis la kasiston pri aŭtomata pago, vi ne bezonas fari ion. Komence de marto ŝi aranĝos vian pagon.

La konto estas: NL10 TRIO 0786 8441 67 je la nomo Esperanto Nederland en Capelle aan den IJssel.

Verloren van Themaatpremio

Ĉu vi verkis interesan artikolon pri Esperanto, kiu estis publikita en nacia gazeto? Aŭ interrete? Ĉu vi konas iun alian kiu havis bonajn kontaktojn kun la ĵurnalistaro? Legu la specialan inviton aliloke en Fenikso kaj anoncu ĝin al la sekretario!

Groningen, la 31an de januaro 2021
Ineke Emmelkamp, sekretario
sekretario@esperanto-nederland.nl

Bonvenon!

Nova jaro komenciĝas. Kun ĝojo mi povas anonci ke en la unuaj semajnoj de 2021 aliĝis 5 novaj membroj.

La novaj membroj loĝas dise en Nederlando:

- Rowan Hulsman el Oegstgeest,
- Trees Huffener el Den Haag,
- An Olijslagers uit Veghel,
- Jeroen van Duuren el Arnhem kaj
- Mariken Lamers el Utrecht.

Mi kore bonvenigas ilin.

Kun Mariken kaj An mi jam konatiĝis ĉar ili partoprenis studosemajnfinojn. Trees lernis Esperanton antaŭ multaj jaroj. En 1986 ni (Trees kaj mi) vojaĝis kune tra Ĉinio. Mi esperas ke en 2021 mi povas konatiĝi kun Rowan kaj Jeroen. Ĉu dum studosemajnfino en novembro?


Unu el niaj membroj donacas abonon je Fenikso al sia korespondamikon Eric Schwartz el Elicott City (Usono). Fenikso nun estas legata en Usono!

Al Koos Scharroo mi sendis hodiaŭ skatolon kun nova materialo kiun li dissendas al la novaj membroj. Tiun taskon mi volonte faris! Eĉ iom pluvetis kiam mi biciklis al la poŝtoŭficejo!

Novaj membroj povas senpage ricevi la gramatikan lernolibron verkitan de Roel Haveman kaj Arjen-Sjoerd de Vries. Nur sendokostojn ili pagas. Ĉu vi jam mendis la libron?

Nova jaro, novaj ŝancoj! Fartu bone.

Ineke Emmelkamp, sekretario de Esperanto Nederland.
sekretario@esperanto-nederland.nl



Pri la libro:

Titolo: "Esperanto Grammatica met Oefeningen"
ISBN: 9789062831449
Prezo ĉe Bol.com: € 64,90
Prezo ĉe UEA: € 30,00

Verloren van Themaat premio 2020


La ĵurio de la Verloren van Themaat premio deziras ricevi kontribuojn por aljuĝi la premion pri 2020. Sendu viajn proponojn ĝis la 30a de aprilo 2021 al Ineke Emmelkamp, Arubastraat 12, 9715 RW Groningen aŭ sekretario@esperanto-nederland.nl.

Jen la reguloj:

Huishoudelijk reglement - artikel 26

1. De vereniging kent en mediaprijs, die de naam "Verloren van Themaatprijs" draagt en die jaarlijks kan worden toegekend aan de persoon die in een jaar de beste informatieve bijdrage over het talenprobleem en/of Esperanto heeft doen publiceren in landelijke, regionale of sociale media.
2. De toekenning geschiedt met redenen omkleed door een deskundige jury bestaande uit 3 personen, die door het bestuur worden benoemd voor een periode van 3 jaar.
3. Kopieën van de betreffende bijdrage, voorzien van de naam van het medium en de datum van publicatie alsmede van de naam van de auteur, dienen te worden ingezonden aan het secretariaat van de vereniging voor 15 januari van het volgende jaar.
4. Het bedrag van de prijs is vastgesteld op € 250,-
5. De bekendmaking van de prijswinnaar geschiedt tijdens de algemene vergadering.

Agadoj de fondaĵo 'Zienderogen' en la jaro 2020



Bildoj el la "verslag Zuid-Afrika 2020"

La redakcio ricevis la novaĵleteron de fondaĵo 'Zienderogen' (Esperante: 'Evidente') pri ties agado en la jaro 2020. La fondaĵo havas historian ligon kun Esperanto, ĉar ĝia fondinto Jacques Tuinder estis esperantisto. La organizo ebligas, helpe de monaj, materiaj kaj homfortaj donacoj, aliron por loĝantoj de ekonomie malpli fortaj landoj, al okulvitroj, medikamentoj kaj helpiloj por vidhandikapitoj. Tiamaniere la fondaĵo strebas preventi nenecesan blindecon.

La kontaktoj kun la landoj kie oni aktivas, pasintece okazis en Esperanto, tiam sub la nomo 'Evidente'. Tiu nomo trifoje entenas la literon e, memorigante pri la komenca nomo 'E3', esperantistoj esperigas esperantojn'.

Kion fondaĵo 'Zienderogen' atingis en 2020? Pro la kronviruso la ebloj estis limigitaj. La fondaĵo starigis kunlaboron kun pli grandaj organizoj. Komence de la jaro okazis misioj en Sud-Afriko kaj la indonezia insulo Ambono. Planitaj vojaĝoj al pluraj aliaj landoj ne povis okazi pro la kronvirusaj limigoj ĉar misio ĝenerale okazas kunlabore kun lokaj medicinistoj kaj helpantoj: liverado de medikamentoj kaj bezonaĵoj por okulekzamenoj kaj operacioj, kaj aliaj helpiloj. Oni faras mezuradojn por okulvitroj. Mondonacoj estas bonvenaj. Por pliaj informoj vizitu www.stichtingzienderogen.nl

Elise Lauwen

Jarraporto 2020 de fondaĵo "Evidente"

La ĉi-jara raporto povas esti iom mallonga: Kovim 19 profunde skuis la mondon. Antaŭa normalaĵo nun absolute malas. Mankas al ni interalie persona kontakto: se antaŭ jaro ni kutimis saluti kiskiskise, ni nun intertuŝetas kubute. Malplej eble ni intervidiĝas, antaŭe kaptinte ajnan okazon. La Kristnasko estis destinita al parencoj, amikoj. Nun ni gastigas etope. Tio ŝajnas granda sufero. Tamen konsidere la celgrupon de "Evidente" ni eĉ bonŝancas. Ilin, en malpli prosperaj landoj, premas pli peza sorto manke de registaraj subtenprogramoj. Ni do kalkulu niajn kristnaskajn benojn, kaj rigardu antaŭen al 2021, espere pli normala jaro. Kiam Eŭropo fartos pli bone, ankaŭ Evidente povos reaktivigi, laŭ nia kompetento havigi pli bonan vidon al homoj: per pli bona vido, pli bonan estontecon!

En la antaŭa Novaĵletero legeblis ĉio kion ni ja povis fari: ja aperas lumeto. Dank' al niaj sponsoroj kaj ŝparuj-spilantoj ni konstruis belan rezervon: sekvontjare ni povos aliri pli ampleksajn projektojn. En la tagordo ja aperas nur skizoj, tamen espere plenumotaj senskrape.

Ni ne plene inertis, sed serĉis kunlaboradon kun pli grandaj organizaĵoj. La multa lobiado kaj interparolado

nun espere fruktos. "Eye Care Foundation" (Okulzorga Fondaĵo) interesiĝis kaj demandis ĉu ni pretas kunlabori en kelkaj projektoj. Precipe per okulmezurado nia fondaĵo povas "aldoni valoron". Kaj eble ni povos investi en pli longdaŭraj projektoj. Ĉu iom optimiste? Almenaŭ laŭ mia delonga deziro.

Ni ancorau ne antaŭvidas konkretan mision, sed ja esperas baldaŭan oportunon. Mi volas esprimi dankon al ĉiu kiu fervore favoris nian agadon, sponsorante, donacante aĵon kaj helpon aŭ libervolan kontribuon de misiano aŭ estrarano.

Fine mi deziras al vi ĉiuj plezurajn Kristnaskan festojn, malgraŭ la reguloj kaj limigojn surmetitajn. Krome bonan jarfinon kaj pli bonan komencon de 2021, en kiu ni – espere – povos superi la koronan viruson. La nova jaro alportu al vi multan feliĉon kaj firman sanon!

Nome de la Plenestraro:

Robert Bos, Daan Simons, Ella Blom kaj Linda Lokhorst, George de Jong, prezidanto de Evidente

Mallongaĵoj

La mil unuaj vortoj

Sendube iuj el ni posedas la kolorriĉan libron *Mil unuaj vortoj* en Esperanto. La sama libro estas ankaŭ eldonita en aliaj lingvoj, interalie en la nederlanda. La titolo supozigas ke komencanto devas unue lerni tiujn 1000 vortojn kaj ke ankaŭ lernolibroj por komencantoj enhavu tiujn 1000.

Tia supozo ne tute aŭ tute ne tuŝas la veron. Ekzistas aliaj 1000-listoj, ekzemple de Van Dale, Wikipedia, Deltas. Eĉ la komunumo Amsterdamo eldonis apartan, bazan vortliston por siaj lernantoj en grupoj 1 kaj 2. Kaj, se vi abonis la Esperanto-revueton *Juna Amiko*, vi ricevis sendube la aneksan liston kun 950 vortoj. Nu, ĉiuj tiuj listoj ja iom similas sed certe ne estas samaj. Fakte nur la listo de *Juna Amiko* havas praktikan signifon. La verkisto uzu nur vortojn el la listo kaj la leganto sciui tiujn vortojn.

Alfonso Pijnacker



Marrie Kardol kreeg het volgende stukje van 17 januari j.l. uit de Texelse Courant toegestuurd van een vriendin die op Texel woont. Ook Baukje Muizelaar-Borger stuurde dit bericht op naar het bestuur.



Erwin Daalder plaatst het bord terug.

Plaat bij Esperantomonument in Den Burg glimt weer als vanouds

De gedenkplaat bij het Esperantomonument aan de Kogerstraat in Den Burg ligt er sinds gisteren weer keurig gepolijst bij. De gedenkplaat, geplaatst op 24 februari 2016, was dof geworden waardoor de letters niet goed leesbaar meer waren. Erwin Daalder nam de plaat de afgelopen tijd onder handen en maakte hem weer helemaal glimmend in de werkplaats van Graaf Spuiterij in Den Burg. De gedenkplaat herinnert aan de oprichting van het Esperantomonument op 30 mei 1935. Drijvende krachten destijds waren Gijs en

Johan Duinker, uitgevers van de *Texelse Courant*. Mede door hun inspanningen bewaamden zich in de jaren dertig rond de vierhonderd Texelaars in het Esperanto en dat was naar verhouding meer dan elders in het land. De taal werd in 1887 ontwikkeld door de Poolse oogarts Lejzer Zamenhof die hoopte dat het Esperanto een gezamenlijke taal in Europa zou worden. Zover kwam het niet, maar de taal wordt door sommige mensen nog steeds beoefend. Daalder heeft op Texel meer monumenten onder zijn hoede die hij onderhoudt.

Portreto de esperantisto

Verkita de Korine Cheizoo

En iu frua mateno aŭdeblis dum elsendo de la nederlanda radistacio Radio 1 la voĉo de Jos Wichmann el Nimego. Li rekte en la radiprogramo parolis kaj klarigis pri Esperanto.

La temo de la radiprogramo al kiu aŭskultantaro kutime pertelefone povas reagi, estis: "Kiu meritas laŭ vi ricevi la Nobelpremio por la paco?". Ĝi estas grava premio por atentigi pri la medio, la monda loĝantaro kaj similaj aferoj. Krome oni taksas ĝin kiel grandan stimulon por krei (mondan) pacon.

Jos tuj reagis kaj proponis kandidatigi L.L. Zamenhof. Plie li rakontis pri Esperanto. La intervjuisto interesiĝis kaj aŭdigis parton de iu anglalingva kurso de Esperanto el la retejo jutuba. Poste sekvis interesa interparolo, dum kiu Jos esprimis sian aprezon de la radiprogramo fluparolanta Esperantlingve en kelkaj frazoj. Jen unu ekzemplo el pluraj pri la aktiveco de Jos.

Okazas regule ke Jos reagis en radiprogramoj. Sed ne nur. Ĉie kie li vidas eblecon paroli pri Esperanto, monda paco, lingvaj kaj tradukproblemoj, li ekagas.

Same en la paperaj komunikiloj li klopodas aktivi. En antaŭa eldono de Fenikso legeblas aktuala ekzemplo, nome kiel li retroŝte reagis al artikolo de kolumnisto Sylvia Witteman en revuo Onze Taal.

Li laŭeble skribas al ĵurnalistoj de gazetoj kiam ili mencias malĝustaĵojn rilate Esperanton, aŭ malbone traktas per antaŭjuĝoj nian universalan lingvon, movadon aŭ kulturon. Ekde kiam Jos lernis Esperanton li interesiĝis kiel lia ĉirkaŭaĵo reagis al Esperanto.

Pro tiuj ĉi, ŝajne ne tiom elstaraj, simplaj ekzemploj mi opinias ke Jos meritas intervjuon. Volonte mi skizos kelkajn sciindaĵojn pri li, jam delonge aktiva Esperantisto.

Lia naskiĝjaro por Esperanto situas iam post la mezlernejo, komence de la okdekaj jaroj. En la mezlernejo li lernis, kiel verŝajne multaj el ni, fremdajn lingvojn. Kompreneble la anglan, kaj krome la germanan kaj la francan.

Tiutempe - antaŭ ĉirkaŭ 45 jaroj, komputiloj ankoraŭ nur alireblis por profesiuloj - al Jos jam ĝenis la fakto ke oni bezonas dikajn vortarojn por ĉiu aparta lingvo. "Tio devus esti ebla en alia maniero", li pensis. Certe ĉar Jos bezonas vortarojn en brajloskribo.

Por tiu punktoskriba maniero bezonatas pli da dika,



speciala papero. Libro kaj revuoj estas ege pli ampleksaj kompare al la nigraj, presitaj tekstoj por vidantaj personoj, kaj do okupas pli da spaco en la hejmo. Krome ekzistas voĉlegado, sed tio ne tre taŭgas por trovi vorton en vortaro.

Kaj jen, dum ĝenerala foiro por vidhandikapuloj, li hazarde trovis budon de Nosobe, kaj informiĝis pri Esperanto. Nosobe estas mallongigo por: Nederlanda societo de blindaj esperantistoj, kiu jam fondiĝis en 1929. Scivoleme li kunportis informojn pri Esperanto, estis forte impresita ke eblas nur ene de tri horoj scipovi la prononcon de la alfabeto. Konkize, Jos diligente eklernis nian komunan lingvon. Kvankam pastro provis malkonsili, dirante ke estus pli saĝe "lerni lingvon kiun parolas multaj homoj." Tamen Jos daŭrigis; ekde tiam li bezonis lingvon kun unu vortaro por atingi homojn el ĉiu angulo de la mondo. Li estas kontenta. Li sekvis lecionojn ĉe Piet Buijnsters en Nimego. Karaj memoroj revenas. Ekzemple, foje, hejmenirante post

leciono, Jos estis tiel impresita de la simpleco de la gramatika regularo, ke li tute ne atentis pri la vojo. Kaj do li vojeraris ĉar lia menso estis plene okupita de ĝojo pri la ĵus traktitaj novaj temoj.

En la jaroj 80-90 Jos partoprenis la famkonatajn renkontiĝojn de la Nederlanda Esperanto-Junularo (NEJ) kaj diversajn internaciajn renkontiĝojn kaj kongresojn en eksterlando, kiel la tiamaj silvestraj semajnoj de la konata germana Esperantisto HDP (IS kaj poste la IF). Ankaŭ tie Jos ofte kontribuis al la programo per muzikumado, ludante la transversan fluton. Ĉar Jos ŝategas muzikon!

Pri lia partopreno en la IJK (Internacia Junulara Kongreso) en 1985 en Eringerfeld, Germanio, li rakontas multon specialan. Tie li surbendigis interparolojn kun diversaj eksterlandanoj, kaj tiuj sonkasedoj kun Esperanto-frazoj poste montriĝis taŭgaj kaj utilaj. Aŭdigante frazojn en nia lingvo al dubantoj pri Esperanto, li ĉiufoje sukcesis konvinki ke Esperanto efikas kiel internacia komprenebla lingvo, kaj montris ekzemplojn de la riĉa Esperanto-kulturo.

Tio ankoraŭ estis en la pratempo de niaj aktualaj interretaj servoj kaj ebloj de hodiaŭ.

Li parolas pri la Internacia Kongreso por Blindaj Esperantistoj en Breda (NL), iam en la okdekaj jaroj. Ĝi estis la unua fojo por Jos. Retrorigardante li opinias ke la renkontiĝo kun aliaj vidhandikapuloj forte kontribuis al lia aŭtonomio kaj memstareco en sia posta vivo. Tia efiko sekvis el la interŝanĝo de utilaj ideoj kaj sugestoj, en internacia medio pere de Esperanto. Nun Jos jam estas estrarano de Nosobe ekde multaj jaroj.

Intertempe, en la nova jarmilo, disvolviĝis multaj novaj helpiloj. Krom la brajlolegilo (NL: braille-lesregel), Jos estas tre kontenta pri la komputila helpprogramo NVDA, kiu ebligas legadon de Esperanto-tekstoj brajle kaj voĉsintezile. Grava afero, emfazas Jos, kaj samtempe ekzemplo ke oni prenas Esperanton serioze. Ne nur al la nederlandlingvaj radistacioj Jos estas fidela aŭskultanto, ankaŭ en internaciaj Esperantlingvaj programoj li partoprenas. Ekzemple, li regule aŭskultas la Esperanto-elsendojn de la Pola Radio, sugestas pri temoj kaj personoj.

Kompreneble Jos uzadas Skype kaj similajn eblecojn por teni la kontaktojn kun aliaj Esperantistoj ĉie en la mondo. Ankaŭ li ĝojegas pri la eblecoj de la nuna epoko, li ŝatas aŭskulti muzikon, prelegojn kaj tiel plu per YouTube. Estas tiom da diversaj ofertoj en Esperanto!



Fine Jos memorigas kiam li eksciis pri sinjoro Verloren van Themaat, pere de voĉlegita revuo en la naŭdekaj jaroj. Li malkovris ke tiu Esperantisto reagis al neĝustaj eldiroj de verkisto Karel van het Reve. Jos estis forte impresita de la daŭra agado de Verloren van Themaat kontraŭ falsaj faktoj pri Esperanto.

Tiu sperto povas esti la fonto kaj ebla klarigo por la senlaca agado de Jos, ĉar li ja ekde la komenco scivolemas pri reagoj al Esperanto. Li sugestas, ke oni havu interparolon kun novaj membroj de Esperanto Nederland: "Kiel via ĉirkaŭaĵo reagis al via decido lerni Esperanton?" Ĉar al Jos oni ofte rimarkas: "Kial lerni Esperanton kiam je ĉiu stratangulo oni parolas la anglan?!".

Ĉiujare ĉirkau la 26-a de julio li aŭdas en la radio pri la apero de la unua lernolibro de Esperanto en 1887. Ĵurnalistoj ŝatas mencii ke "Esperanto estis bona ideo sed ne sukcesis". Kaj multaj similaj malafablaj eldiroj. Jos bedaŭras tion.

Jos celas, ke oni havu la scipovon doni tujan reagon. Li proponas, ke ni konservu iam faritajn ĵurnalistajn demandojn kune kun preferitaj eblecoj por respondi.

Jen ekzemplo de aktiva Esperantisto kun multaj ideoj.

Deelnemers redactieraad gezocht

Hoe bevalt Fenikso jou? Vind je het leuk om te lezen? Wat vind je interessant en wat niet zo? Wat zouden we nog meer in het blad op kunnen nemen? En wat vinden de andere lezers er van? De redactie zou graag zo nu en dan terugkoppeling krijgen over wat beter kan. Daarom heeft ze aan het bestuur gevraagd of het een redactieraad zou willen aanstellen.

Wat doet de redactieraad?

De redactieraad kijkt en leest Fenikso door, vraagt aan andere lezers naar hun mening en bespreekt dit samen. Hij komt enkele keren per jaar samen (fysiek of digitaal). Vervolgens geeft hij tips en advies aan de redactie over wat beter of mooier zou kunnen. Hij houdt daarbij rekening met de mogelijkheden die er zijn. De redactie gebruikt dit om het blad beter te maken. Niet alle advies hoeft ze op te volgen.

Wie kunnen meedoen in de redactieraad?

Iedereen die lid is van Esperanto Nederland en interesse heeft om mee te doen, kan zich hiervoor opgeven. De enige voorwaarde is dat je online kunt vergaderen. Het bestuur kiest 3 tot 5 mensen van verschillende leeftijden en interesses uit om de redactieraad te vormen. De redactieraad kiest daarna zelf een voorzitter uit zijn midden. Leden van de redactieraad worden aangesteld voor de duur van 2 jaar.

Waarom meedoen in de redactieraad?

Fenikso is een blad voor en gemaakt door de leden. Het is een belangrijk middel om leden bij de vereniging te betrekken. Redacteuren worden vaak geleid door de waan van de dag en het is lastig om het eigen werk kritisch te beoordelen. Daarom is het prettig dat er mensen zijn die er zo nu en dan eens met een helikopterblik naar het blad kunnen kijken. Daarnaast is het deelnemen in de redactieraad ook een leuke manier om andere leden te ontmoeten.

Je krijgt een beperkte vergoeding voor de kosten die je maakt voor het fysiek bij elkaar komen.

Lijkt het je wat om mee te doen in de redactieraad, meld je dan voor 10 april aan bij Ineke Emmelkamp. Mailadres: sekretario@esperanto-nederland.nl.



Novaj estraranoj kaj kunlaborantoj serĉataj

Prezidanto serĉata

Ekde la retiriĝo de Said Baluĉi la unuan de januaro 2021 ni serĉas novan prezidanton! Nun ne okazos elekto pri nova prezidanto, se ja eblas jam nun anonci sin kaj eklabori en la estraro.

Kion faras prezidanto?

- Prezidanto prenas la iniciaton kaj gardas la diversajn projektojn.
- Prezidanto gvidas la jarkunvenojn kaj estrarajn kunsidojn. Kelkfoje estas alia homo kiu gvidas la kunvenojn kiel unutaga prezidanto.
- Vi gvidas la estraron kaj iniciatas kaj kunordigas la diversajn taskojn.
- Vi prezentas la asocion dum internaciaj, naciaj kaj eksteraj kontaktoj.

En la agadplano (Beleidsplan) vi legos la planojn kiujn ni havas por la venontaj jaroj. Vidu: [Fenikso 2, jaro 2020](#)
Estraraj kunsidoj okazos en Utrecht. Aŭ en venontaj monatoj virtuale.

Aliaj kunlaborantoj:

Se vi ankoraŭ ne certas ĉu al vi plaĉas esti sekretario, vi estas bonvena ĉeesti plurfoje la estrarkunsidojn. Ankaŭ se vi havas spertojn pri aliaj taskoj, kiel ekzemple teknikajn spertojn pri virtuala kunvenado, fari filmetojn kaj/aŭ prezentojn por la retejo kaj Facebook, vi povas proponi vin kiel estraranon.

Ĉu vi konas iun kiu povus esti prezidanto, sekretario aŭ eventuale estrarano kun speciala tasko? Se vi konas iun kiu ŝatus esti estrarano aŭ kunlaboranto, sed ne kuraĝas proponi sin mem?

Vi povas proponi ŝin/lin/rin al la sekretario: sekretario@esperanto-nederland.nl, 050-5718842.
Demandoj estas ankaŭ bonvenaj.

Kun koraj salutoj,
Ineke Emmelkamp, sekretario Esperanto Nederland
sekretario@esperanto-nederland.nl, 050-5718842

Sekretario serĉata

La sekretario Ineke Emmelkamp, demisios dum la jarkunveno, kiu espereble povas okazi en oktobro 2021.

Kion faras sekretario?

- Tiu ĉi estrarano prizorgas ĉiujn sekretariajn procezojn de la asocio. Vi organizas la estrarkunsidojn, faras la raportojn, ekz. agadraporton.
- Atentas pri la listo de farindaj/farendaj taskoj, respondas al plej diversaj petoj kiuj alvenas poŝte aŭ rete. Nun Esperanto Nederland havas protokolanton por la estrarkunvenoj kaj jarkunvenoj.
- Vi povas akurate labori kaj povas uzi la programojn Excel, Word kaj similajn programojn.

S-ro Frans Timmermans uzas la anglan lingvon

Fine de novembro Simon Smits skribis leteron al s-ro F. Timmermans, vicprezidanto de la Europa Komisiono en Bruselo.

Li ricevis la jenan reagon:

"Geachte mijnheer Timmermans,

Afgelopen zondag 22 november rond 20.00 uur zag ik u op televisie spreken. U deed dat in het Engels!

Ik vond dat vreemd; want de talen van de landen van de Europese Unie zijn gelijkberechtigd.

Het is ook de mogelijkheid om de eigenheid van de aangesloten landen te benadrukken. Op de webstek van de Europese Unie is de zin te vinden:

"Als democratische internationale organisatie beschouwt de EU meertaligheid als een van de grondbeginselen van de Europese Unie". Als vertegenwoordiger van één van de staten moet men zijn taal tot uitdrukking kunnen en willen brengen.

Wil men echt een internationale taal voor gebruik in de Europese Unie hebben, dan is daar de internationale, neutrale taal ESPERANTO. Inlichtingen daarover zijn op internet te vinden. Ik verzoek u kennis te nemen van mijn mededeling. Bij voorbaat dank.

Hoogachtend,
S.P. (Simon) Smits (voorzitter van de "Stichting Taalverdediging") "

Di 22-12-2020 15:56

Geachte heer Smits,

Dank voor uw brief aan dhr. Timmermans. Hij ontvangt veel berichten en heeft mij gevraagd u te antwoorden – ik hoop dat u mij dat toestaat per e-mail te doen.

Het is mij op basis van uw brief helaas niet duidelijk welke uitzending u heeft gezien. Ik vermoed echter dat het een fragment is geweest uit een recente persconferentie over één van de Green Deal-voorstellen. Zoals u wellicht weet spreekt dhr. Timmermans vele talen. Hij heeft de gewoonte de vragen te beantwoorden in de taal waarin ze zijn gesteld, in dit geval zal dat Engels zijn geweest. Dit soort algemenere optredens worden in sommige gevallen alsnog gebruikt door de Nederlandse omroepen. In directe gesprekken met Nederlandse pers of andere Nederlandstalige vertegenwoordigers spreekt dhr. Timmermans uiteraard Nederlands.

Het door u aangedragen alternatief esperanto is geen erkende taal in de Europese instellingen.

Vriendelijke groet en beste wensen voor het nieuwe jaar,

Jori KEIJSPER (Ms)

Communication Advisor
Executive Vice-President Frans Timmermans
European Green Deal
European Commission

Spreken katten dezelfde taal?

Volgens Carel van Heugten op Quora is het bekend dat verschillende soorten inderdaad verschillende `talen` zelfs dialecten `spreken`. Dat wordt uitgezocht met computerprogramma`s die de verschillende klanken analyseren. Net als bij ons komen bepaalde klanken en klankcombinaties meer voor dan andere. Bij walvissen, orka`s, dolfijnen, dieren die qua slimheid het dichtst bij ons staan, is inderdaad een variatie aan talen aangetroffen, waarom niet bij katten?

Bron: <https://nl.quora.com>



Taal oorzaak van bijna-ramp op Westerschelde

In het voorjaar van 2019, op 1 april net na middernacht, voltrok zich op de Westerschelde bijna een grote scheepsramp. Doordat de kapitein van het cruiseschip Viking de instructies van de verkeersleider niet direct had begrepen, was een tanker bijna dwars over het cruiseschip heengevaren.

Het cruiseschip had aan boord 171 passagiers en 49 bemanningsleden. Op de Westerschelde is een cruiseschip een bescheiden scheepje, dat nauwelijks opvalt tussen de containerreuzen en tankers. Alleen door snel ingrijpen van de loods op de chemicaliëntanker Chemical Marketer, waardoor deze nog iets kon uitwijken, bleef dit incident tot blikshade beperkt.

Simon Smits schreef een brief aan de Rijkswaterstaat in Vlissingen, n.a.v. de oorzaak en de conclusie van de Onderzoeksraad Voor Veiligheid (OVV), zoals die in de Zeeuwse krant, de PZC op 19 december 2020 was geschreven.



De OVV:

„De Servische kapitein en zijn Oekraïense stuurman hadden jaren ervaring in de riviercruisevaart. Maar niet op de Westerschelde. De Serviër sprak een mondje Engels, maar niet genoeg om de instructies van de verkeersleider direct te kunnen begrijpen. Iets wat cruciaal is in een noodsituatie. Die incompetentie had tweehonderd levens kunnen kosten en een milieuramp kunnen veroorzaken.

De OVV stelt:

„Het ontbreken van aanvullende bepalingen voor de binnenvaart voor het Westerscheldegebied en het onvoldoende toetsen van de beheersing van de vereiste voertaal, belemmeren een veilige doorvaart van riviercruiseschepen.”

Brief aan de Rijkswaterstaat in Vlissingen:

's-Heerenhoek 21 december 2020

Geachte mijnheer,

Naar aanleiding van het artikel “Zo gezien” in de PZC van vorige week wil ik het volgende aan u voorleggen. In het artikel wordt aangegeven, dat “de Servische kapitein een mondje Engels sprak, maar niet genoeg”.

Verder maak ik uit de tekst op, dat gezagvoerders in het verkeer op de Westerschelde voldoende kennis van het Nederlands of Engels moeten bezitten. Welnu: ik zou zeggen, dat als men geregeld op Nederland vaart, dan moet men de taal van dat land kennen.

Engels is wel belangrijk, maar in Europa zijn er landen met belangrijke talen als het Duits en het Frans. Als men in rivieren in die landen vaart, zou men ook de taal van die landen moeten kennen.

Er is voor deze taalverscheidenheid een wereldwijde oplossing, namelijk de internationale, neutrale taal ESPERANTO. Deze taal is in 1887 uitgegeven door de Poolse oogarts dr. L.L. Zamenhof. Het is een taal, die door zijn regelmatigheid betrekkelijk gemakkelijk is te leren. De taal wordt in de meeste landen van de wereld beoefend. Het kantoor van de internationale vereniging van esperantisten is in Rotterdam gevestigd. Om u nader kennis met deze taal kennis te laten maken voeg ik een paar informatiedocumentjes toe.

Ik bedank u bij voorbaat voor uw belangstelling.
Hoogachtend, S.P. Smits

Engels ongewenst

Hieronder een artikel uit het Parool van 13 januari.

Kees Ruig:

"Hierbij een interessant artikeltje uit Het Parool. Frankrijk zoekt een lingua franca. Nou die hebben we in de aanbieding nietwaar?"

Fransen tegen steenkolenengels

Tom Kleft
AMSTERDAM

Als het aan de Fransen ligt, is het binnenkort afgelopen met dat eindeloze Engels gepraat binnen de instituties Europese Unie. Nu het Verenigd Koninkrijk de EU heeft verlaten, is het volgens de Franse minister van EU-zaken Clément Beaune 'moeilijk uit te leggen aan mensen dat we met zijn allen vasthouden aan een soort gebroken Engels'.

Dat Frans niet de *lingua franca* is

in Europa, is de Fransen al langer een doorn in het oog. Maar Beaune zegt dat hij geenszins wil dat Frans nu dan de werktal moet worden van de EU. In plaats daarvan, zo zei hij aan journalisten, wil hij dat binnen de EU 'taalkundige diversiteit' gevierd wordt. "Laten we weer wennen aan het spreken van onze talen!"

Hoe hem dat praktisch voor ogen staat, deed hij niet uit de doeken. Hij zei in de aanloop naar het Franse EU-voorzitterschap, in de eerste helft van 2022, met 'concrete ini-

tiatieven' te komen. Dat plan zou onder andere taallessen omvatten.

Binnen de EU zijn nog twee landen die Engels als een officiële taal aanmerken: Malta en Ierland. Maar beide landen gebruiken dat naast Iers en Maltees. Voor de rest is Engels een tweede taal, op zijn best – en dat is lang niet altijd van even best niveau. Volgens *Politico* wordt er geregeld geklaagd over de verbasterde versie van het Engels die in de Brusselse bubbel wordt gesproken, ook wel *Globish* genoemd.

Lingvomodelo prognozas virusevoluon

Interdisciplina kunlaboro kelkfoje povas rezulti en tute novajn alirojn al problemo. Ekz.e inter lingvosciencistoj kaj biologoj. Jen novaĵo el revuo por biologoj.

La mutaciojn per kiu virusoj povas eskapi al vakcinaĵoj, kontraŭvirusaj medikamentoj aŭ la imunsistemo, oni povas prognozi helpe de lingvistika modelo. Oni kreis lingvistikan modelon por trejni komputilojn tiel ke ili komprenos homan lingvaĵon. MIT[1]-esploristoj uzis la sininstruan (memlernan) algoritmon esplorante la aminoacidajn sinsekvojn de la infektaj proteinoj de la eksteraĵo de sars-cov-2 (KOVIMO-19), influenco kaj hiv-1. La modelo sufiĉe akurate indikas ne nur la tiel nomatajn eskapajn mutaciojn, sed ankaŭ la regionojn de la RNA kie la probableco de tia mutacio estas plej granda.

La esploristoj kompreneble konscias ke lingvoscienco kaj virusologio estas tute diferencaj fakoj. Sed ili vidas klare la similecojn inter la ecoj de lingvoj kaj virusoj. Samkiel frazoj devas obei iujn gramatikajn regulojn, mutaciaj virusoj devas obei al aro da biologiaj reguloj por postvivi. Ekz. mutacio ne difektu la infektan potencon de la viruso por eniri la ĉelojn de la gastiganto. Ŝanĝo de unu vorto en frazo povas ŝanĝi la signifon de la frazo kaj tiel mutacio en la virusa RNA povas ŝanĝi la virusan materialon tiel ke la imunsistemo ne plu rekonos ĝin.

La esploristoj per la algoritmo povis identigi partojn de la proteino kiuj havas grandan probablecon de eskapo. Oni tiel povas multe pli rapide prognozi problemecajn virusmutaciojn en diversaj virusoj.

Aliaj esploristoj sin demandas ĉu la modelo vere estas aplikebla, ĉar la individua imunsistemo sufiĉe varias

inter homoj. Kaj iuj sin demandas ĉu la prognoza kapablo de la modelo estas sufiĉe bona por uzi ĝin por vakcinaĵproduktado.

(El: Bionieuws 1, 2021 <https://bionieuws.nl/view/35298#1>)

Verkisto: Steijn van Schie, tradukisto: Bert de Wit, <https://bionieuws.nl/view/35298#1>

[1] MIT= Masaĉuseca Instituto pri Teknologio

Martin Ptasinski pri la Soraba lingvo



(Reta prelego el Hercbergo, septembro 2020)

En la periodo antaŭ la Vejmara Respubliko (1920) ne estis ingvopolitiko rilate al la soraba lingvo en Germanio. Estis grupo kiu parolis tiun slavan lingvon, sed oni fakte ne agnoskis ĝin. Nomoj de urboj kiel Rostock, Berlino, devenas fakte de la soraba lingvo. En la Vejmara Respubliko etnaj lingvoj, kiaj la dana, la frisa kaj la soraba estis permesitaj, sed ne aktive instruataj kaj tolerataj. Dum la Tria Regno oni unue provis igi la sorabojn "ĝermanoj", sed post 1937 la soraba lingvo estis tute malpermesita de la Nazioj. Perforta germanigo. La 10-an de majo 1945, unu tagon post la fino de la dua mondmilito, oni refondis "domovina", (hejmlando), la asocion de sorabparolantoj. La refondiĝo okazis en la soveta zono kaj dum kelka tempo oni konsideris la eblecon ke la regiono en Malsupra Saksio kaj Brandenburgio kie la soraba estis parolata, estu kunfondata kun Ĉeĥoslovakio, sed la soveta komandanto ne volis fari tion, timante ke la Germana Demokratia Respubliko fariĝu tro malgranda. La landoj kaj distriktoj akceptis leĝojn por la protektado de la sorabaj lingvo kaj kulturo. Stasi-o kontrolis la sorabajn asociojn, ĉar ili havis intimajn rilatojn kun la Tito-registaro en Jugoslavio. Tito eĉ postulis ke en la GDR-ambasadejo en sia lando estu certa %-aĵo da sorabparolantoj.

Oni rajtis instrui la soraban, oni metis dulingvajn ŝildojn en la sorabaj regionoj, la GDR-registaro provizis financajn rimedojn por stimuli la soraban kulturon. Oni povis registri "sorabano" en la pasportoj de GDR-civitanoj. Tio estis laŭ la GDR-reĝimo "modela socialisma minoritata politiko". Frisoj kaj danoj en okcidenta Germanio ne havis la samajn rajtojn kiel la soraboj en GDR. La malavantaĝo estis ke tiu ideologio rekte rilatis al la sorto de la minoritato. Oficiale nenio ŝanĝiĝis post 1990.



Germanio ekhavis novan oficialan lingvon krom la germanan. La malavara subteno far la ŝtato malaperis, sed ekestis fondaĵo por subteni la soraban lingvon kaj soraban kulturon. En 1982 en GDR-tempo oni fondis lernejon por germanoj kiuj volas lerni la soraban, sed poste, en 1992, la lernejo fariĝis hejmo por azilpetantoj. Estis granda manko de financoj kaj lernejoj kiuj havis malpli ol 15 lernantoj en urboj kaj urbetoj ne plu povis daŭrigi la instruadon de la soraba. Lernantoj devis aŭ iri al lernejo sen instruado de la soraba aŭ al pli granda urbo, kiel Bautzen. Ĝojige estas ke turistoj havas pli kaj pli da intereso pri la soraba kulturo.

Folkloro ĉe la soraboj: ekz.e la birda geedziĝa ceremonio por infanoj, „Vogelhochzeit“ en la germana kaj perĉevala „kochtirado“. Tio estas komparebla kun la ansertirado en iuj partoj en Nederlando, kiam oni pendigas mortajn bestojn sur ŝnuro kaj devas rajde forŝiri la korpon. Estas ĉefe gejunuloj nuntempe kiuj ekinteresiĝas pri la folkloro. Tio estas tre grava por konservi onian identecon.

La lingva evoluo de la soraba lingvo okazas sub la konsiloj de soraba akademio. Tute komparebla al la Akademio de Esperanto.

De Bert de Wit, 15-12-2020 12:38

Kiu transprenas akordionojn?

Antaŭ 22 jaroj la akordionisto Henk Kuijk malfermis la plej grandan akordionmuzeon de Eŭropo (kaj eble en la mondo?) en Malden apud Nimego, nomita "De Muse". Kaj nun ĝi estas fermita pro la kronviruso.

Tio kunlige kun la aĝo de la posedanto kaj la fakto ke la komunumestraro haltigis la subvencion, decidigis lin vendi ĉion. La vendo de la konstruaĵo ne estas malfacila sed la vendo de la unika kolekto de akordionoj kaj harmonikoj estas sufiĉe komplika. Jam de la komenciĝo de la muzeo, kiu enhavis ankaŭ muzikafejon, ĝi estis konata de pluraj Esperantistoj. La muzegvidilo ekzistis en Esperanto, gvidado tra la muzeo eblis en Esperanto. Diversaj Esperantistoj en- kaj eksterlandaj vizitis ĝin. Kiam la muzeo estis vendota, eĉ el Moskvo venis interesiĝanto helpe de Esperantisto kaj okazis la komunikado en Esperanto. Sed la negoco ne sukcesis pro diversaj kialoj, i.a. manko de spaco en la nuna akordionmuzeo en Moskvo. Ĝis nun vendado de la muzekolekto ne sukcesis malgraŭ la malalta monsumo petita.

Se vi scias iun (organizon, muzeon) kiu eble interesiĝos pri la transpreno de la unika kolekto, bonvolu kontakti min.

Kees Ruig
k.ruig@hotmail.nl



Esperanto-zegels aangeboden

Bij het opruimen van de zolder stuitte ik op een oud boekje met een behoorlijk aantal Esperanto post/sluitzegels. Ik heb een nieuw postzegelboek gekocht en alle zegels netjes gerangschikt, het zijn er ongeveer 450 stuks.

De achtergrond van het verzamelen weet ik helaas niet. De Esperanto zegels zijn verzameld door de heer Jules Balasz. De heer Balasz is de overgrootvader van mijn kinderen. Hij moet geboren zijn rond 1900 in Budapest. De heer Balasz is met zijn Hongaarse vrouw in 1954 naar Amsterdam gekomen. Vermoedelijk is hij de zegels gaan sparen voor de tweede wereldoorlog.

Nu ben ik op zoek naar iemand die deze zegels op hun waarde kan schatten en over wil nemen. Bent u die persoon of kent u iemand die interesse heeft in deze verzameling, dan kunt u contact opnemen via e-mail: jess_laracker@hotmail.com.

Hierbij voeg ik een aantal exemplaren bij.

Jessica Laracker





Revuo-interŝanĝo de Alfonso Pijnacker

Alfonso Pijnacker legas ricevatajn Esperantajn gazetojn el la tuta mondo. Pri la plej legindaj artikoloj li skribas en Fenikso kaj se iu interesiĝas pri iu artikolo li sendos la skanitan artikolon. Bedaŭrinde ĉifoje li ne ricevis gazetojn. Se vi havas abonon al revuo, bonvolu kontakti Alfonso por ke li povu legi la revuon. Lia retpoŝtadreso: a.pijnacker@simpc.nl.

Atentu la limdaton, avertis min la ĉefredaktoro. Do, urĝa tempo por kolekti la ingrediencojn por mia "revuo-interŝanĝo". Jen la paperaj revuoj, kiujn mi havas por vi:

ESPERANTO, numeroj 1352-decembro 2020 kaj 1353-januario 2021.

En numero 1352 ne nur troviĝas la kotiztabelo de UEA por 2021 sed ankaŭ rakonto de Dai Shengqiao pri la urbo Wuhan, jes ja, la urbo, konata de la koronaviruso. Mian atenton tiris la intervjuo kun Ilija Smikov, loĝanta en la rusa urbo Sergijev Posad. Mirige ke en la plej foraj lokoj de la mondo loĝas esperantistoj kiuj fakte sole el nobla vidpunkto agadas por nia movado.

En numero 1353 memkompreneble la novjara mesaĝo de la UEA-prezidanto. Ĉiam necesaj tiuj ĉi solenaj paroladoj sed mi supozas, ke la ankoraŭ estantaj UEA-oficistoj pli pensas al siaj postenoj kaj salajroj, sciante ke en UEA monmanko nun pintiĝas. Feliĉe mi trovis recenzon pri la libro "Ne kredu ĉion, kion vi pensas". Ĝis nun mi ne ĉion kredis kion mi vidis kaj legis, sed ekde nun mi malfidas eĉ miajn pensojn, emociojn kaj kondutojn. Nu, la libroforma instrukcio por sanigi kaj feliĉigi vian cerbon kostas ĉe UEA nur € 16,50.

LA REVUO ORIENTA, numeroj 10-oktobro 2020 kaj 11-novembro 2020.

En la revuo staras ĉiam unupaĝa artikolo "Esperanto kaj MI", en kiu ne-japana esperantisto rakontas pri si mem kaj sia esperantistiĝo. Nun enestas Judith Kovacs, vera kolektanto de esperantaĵoj, kaj Petro Chrdle, kies nomo ĝis nun por mi ne estis elparolebla. Li estas honora membro de UEA, do sufiĉe grava por konatiĝi kun li.

Mirige, en numero 11, ke aŭstralia instruisto en japana organo rakontas pri la Montesoria instru-metodo kaj li opinias ke Esperanto bone lerneblas per tiu ĉi metodo.

En numero 10 la artikolo "La artoj elvivi en postsoveta Rusio", verkita de Mikaelo Bronŝtejn. Kiu povus pli bone rakonti pri la politika ŝanĝiĝo ol tiu, kiu mem spertis. Kion signifas la senvaloriĝo de la mono, povas klarigi ĝuste Mikaelo.

NORVEGA ESPERANTISTO numero 6/2020.

La enhavo praktike rilatas al la movado en Norvegio. Tamen estas artikoleto pri la prononco de "r". Ne nur ĉinoj sed ankaŭ aliaj ofte ne klare elparolas la literon "r". Ja, por eviti fatalan mison, estu aŭddiferenco inter "mi ŝatas kurson kun vi" kaj "mi ŝatas kuŝon kun vi".

SENNACIULO, numero 1385-1386 novembro-decembro 2020.

Sennaciulo, ĉiam batalema kontraŭ maljustaĵoj kaj por demokrataj procezoj. Kadre de tio mi vidis artikoleon de Rob Moerbeek, nun ne pri fumado aŭ lingvo-eraroj sed pri civitana interkonsiliĝo. Plie min altiris la historia artikolo de Lenin pri Herzen, publikigita en 1912 kaj nun tradukita el la rusa de Jurij Finkel. La artikolo reaperis ĉar en 2020 kunmemoriĝis la 150a datreveno de la morto de Alexander Herzen, fondinto de la kamparana socialismo en Rusio, kaj de la naskiĝo de V.I. Lenin, bolŝevika gvidinto.

Aliaj artikoloj en tiu ĉi revuo rilatas i.a. al Okinava Batalo, Irako, Turkio, Kurdio. Mi diru ke mi ofte iom tristas post lego de Sennaciulo. Pli da ĝojo bonvenus. sed eble mi ne pretas sperti ke multloke la vivĉirkonstancoj estas ŝokaj.

FINO

Nu, se vi ŝatas ricevi unu el tiuj ĉi revuoj aŭ artikolon el ili, bonvolu skribi al mia retadreso a.pijnacker@simpc.nl.

Roterdamo 2020

Dum la pandemio la verkisto iris en sian kelon kaj trovis lukon neniam viditan antaŭe. Li falis al la jaro 4020 kaj renkontas Fobo-n: malgrandan, senharan, estulon. Manĝado de bestoj ŝanĝiĝis en 4020.

Fobo: Mi povas porti vian hundon Gorgi al vi, nun, tuj, kondiĉe ke vi buĉu kaj manĝu ĝin. Ĉu vi akceptas?

Mi: Ĉu vi estas freneza? Klaras ke ne!

Fobo: Ne, mi ne freneziĝis. Mi volas nur memori al vi tion kiun vi jam konscie aŭ subkonscie

scias. Se temas pri vivoŝato aŭ mortomalŝato, estas nenia diferenco inter Gorgi kaj tiuj porko, bovo, ŝafo, koko, salikoko ktp. kiun vi manĝas. Ĉu vi komprenas min?

Mi: Mi honte konfesas ke jes, mi komprenas vin.

Fobo: Nu, bone, ne hontu. Estis nescio. Nun manĝu vian serviandan pladon. Bonapetiton!

Mi finmanĝis. Vere eblas ĝui manĝadon serviandan.

Sed mia ĝuo ne longe daŭris. Mi aŭdis rin diri:

-Nun vi estas preta aŭskulti mian planon.

Subite mia tuta korpo komencis tremi. Estis pro ia nekonata timo. Ia stranga sento. Mi ŝvitis, mi bezonis pisi...Ri rigardis min komplete kaj filozof-al-plebane diris: - Iru unue pisi kaj poste trinki iom da akvo. Vi estas ĉasaĵo, senrimedulo, sklavo, viktimo, oferaĵo...mi povas facile mortigi vin...

Mi: Ja kial?

Fobo: Sed ne timu Homus Stultus, ha ha ha! Mi ne volas mortigi vin.

Mi iom trankviliĝis, iris pisi iom for de Ri kaj poste trinkis iom da akvo, kiun Ri kunportis kun la manĝaĵoj.

Mi demandis Rin: - Do, kion vi volas de mi precize?

Fobo: Mi volas ke vi mortigu iun.

Mi: Neeeeee...

Fobo: Jeeeeesssss! Kaj vi faros! Se ne, mi mortigos vin.

Mi: Ne estas juste. Vi perforte devigas min. Vi diras ke via popolo jam estas evoluinta sed vi agas pli kruele ol Homus Stultus!

Fobo: Ni ne estas kruelaj.

Mi: Ĉu mortigo ne estas kruelaĵo? Fobo: Jes, estas.

Mi: Sed eble la via ne, ĉu? Fobo: Ankaŭ la nia jes.

Mi: Do kial mi devas faraĉi tiun kruelaĵon?

Fobo: Vi ne faraĉos kruelaĵon. Mi: Kion do mi precize faros? Fobo: Vi manĝos iun ha ha ha! Mi: Neeee...

Fobo: Vi helpos al la scienco.

Mi: Mi konfuzis ĉion. Mi petas vin iom pli klare klarigi, homlingve.

Fobo: Bone, mi jam alproksimiĝis al la klarigo, sed vi ne bone aŭskultas. Do nun bone aŭskultu. Jam de milionoj da jaroj la animaloj manĝis unu la alian. Ĝenerale la pli superaj la malpli superajn. Nek homoj, nek ni Suhomoj, ĝis nun testis kio okazus se tiu "natura" ciklo inversiĝus. Nun ni havas sufiĉe progresintajn instrumentojn kaj teknologion testi tion per nur unuopa

kazo, t.e. per nur unu homo kaj nur unu Suhomo.

Nature ni devus atendi la rezulton dum miloj da jaroj, sed nun ne estas bezonate.

Mi: Momenton, ĉu vi volas ke mi manĝu vin?

Fobo: Hoooo esperiga progreso en vi! Verŝajne via inteligento ankoraŭ funkcias. Jes kaj ne.

Vi manĝos ne min, sed alian Suhomon kiun oni preparis por ĉi celo. Ri mem ankaŭ volontulas.

Mi: Ĉu ri volontulas morti nur por scienca eksperimento?

Fobo: Ekzakte. Ni esperas ke poste ni povos savi rin, sed ankaŭ ekzistas la probablo ke ni ne sukcesos. Ri mem akceptis ajnan riskan konsekvencon.

Mi: Ĉu vi povos savi rin? Eĉ post la digestiĝo?

Fobo: Estas iom komplika por via kompreno.

Simpledire la Suhomo havas eternan nekorpan kernon kiu entenos ĉiujn riajn travivaĵojn en formo de informoj. Tiun kernon teorie ni povos reenkorpiĝi. Ankaŭ tio estas parto de nia plano.

Mi: Sed kial mi devas manĝi rin? Ĉu ne eblas ke mi manĝu ekzemple porkon?

Fobo: Niaj teorioj diras ke ĝis nun la homoj manĝadis la malplisuperajn bestojn. Ĉar ne ekzistis pli supera ol homo. Tial la homoj restis ĉiam en limigita nivelo. Nun ni volas doni al vi manĝon pli superan ol via nivelo. Ne eblas inverse. Kompreneble iuj homoj asertis ke ili manĝas nur "lumon" sed ni ne povas pruvi tion nun. Ĉu vi komprenas?

Mi: Preskaŭ jes. Sed kiel mi manĝu rin? Ĉu buĉi, kebabigi...

Fobo: Ha ha ha! Homus Stultus. Eĉ en viaj krimaĵoj vi serĉas plezuron? Ĉu vi volas viskion kun via kebabo? Ha ha ha!

Mi: Ne, sed mi zorgas. Mi neniam manĝis homon aŭ pli superan estulon...

Fobo: Ne zorgu. Vi ne mortigos rin. Ankaŭ ni ne. Ria nomo estas ZZ 99 999 999 111, sed vi povas voki rin mallonge Zozo, ĉar en tiu kategorio ri estas unika. Plej unue vi du devas interkonatiĝi. Viaj intimaj kunlaboroj pli faciligos nian eksperimenton.

Zozo estis kiel Fobo, pli-malpli samforma, sed mi sentis ian rian knabinan ridon. Ni multe babilis. Laŭ mia impresio ri havis pli virineskan "kernon" ol Fobo.

Kvankam Fobo jam klarigis ke ili estas samtempe kaj viro kaj ino, tamen estis mia unua impresio ke malgraŭ la samformeco de la korpo, ia diferenco konstatablas inter iliaj "kernoj".

Venontfoje la daŭrigo de la rakonto.

Rakonto verkita de Saïd Mozaffari

Vortserĉenigmo

La temo de la enigmo de ĉi tiu eldono estas **promenado**.

Solve ĉi tiun enigmon per forstrekado de ĉiuj vortoj el la listo sube. La restontaj literoj kune formas frazon.

Kreita de Frank van Hertrooij

Solve de la lasta vortserĉenigmo:

"Mi povus kanti dek mil amkantajn nur por vi"

Arbaro	Maro
Arbustoj	Montaro
Beroj	Naturo
Birdetoj	Neĝas
Blazoj	Papilio
Blovas	Parko
Boto	Pieddoloro
Dorsosako	Plaĝo
Ekstere	Promeni
Fajfi	Rubuso
Floroj	Sciuro
Grimpi	Suno
Hundo	Ŝuoj
Iri	Tendo
Kafo	Tero
Kanti	Vadi
Konkoj	Vagi
Manenmane	Vojeto
Mantelo	

Ĉ	D	O	R	S	O	S	A	K	O	P	L	A	Ĝ	O
U	V	E	A	I	T	E	R	E	T	S	K	E	O	E
A	J	S	N	R	O	R	A	T	N	O	M	K	B	L
O	R	O	A	A	B	H	U	N	D	O	R	A	E	V
B	I	B	Z	V	M	A	R	O	F	A	J	F	I	O
N	E	L	U	A	O	N	R	V	P	T	G	O	R	J
O	A	R	I	S	L	L	E	O	O	R	E	O	L	O
J	M	T	O	P	T	B	B	N	I	J	L	R	U	T
O	A	S	U	J	A	O	I	M	A	O	E	O	O	E
R	N	S	T	R	P	P	P	N	D	M	S	T	R	D
O	T	A	E	K	O	I	O	D	E	U	V	M	O	R
L	E	Ĝ	N	A	E	N	E	I	B	M	V	A	D	I
F	L	E	D	N	K	I	S	U	N	O	O	U	G	B
N	O	N	O	T	P	O	R	U	I	C	S	R	M	I
Ŝ	U	O	J	I	R	I	K	O	N	K	O	J	P	I



TEJO - Tutmonda Esperantista Junulara Organizo:
<https://www.tejo.org/nl/ijk-2022-okazos-en-nederlando/>

Ni ĝojas anonci ke la 78-a Internacia Junulara Kongreso #IJK2022 okazos en De Roerdomp - Westelbeers, Nederlando!

In de zomer van 2022 vindt het Wereld Esperanto Jongerencongres plaats in Nederland!

La ĉeforganizanto Rogier Hurman diras:
"La loko estas vere mojosa, kiel propra vilaĝo kun esperantistoj. Ni estas bone preparitaj kaj multe da laboro estas jam farita".



Midas Dekkers

Pri la pasinta jaro 2020:

"Mi jam timis ke vi demandos al mi kion mi opinias pri la jaro 2020. Tiam mi respondus ke la jaro 2020 estas la jaro de humileco. Ni devis agnoski ke ni ne estas la ĉionpovaj regantoj de la tero. Kiujn ajn ideojn ni havas, kiun ajn Dion ni adoras, ni ĉiuj konsciis ke ekzistas ankoraŭ pli granda potenco. Eĉ la gvidantojn de ĉi tiu planedo faligis io tiom eta, ke ni eĉ ne povas nomi ĝin vivanta estaĵo".

(en *Knack*, la 6an de januaro 2021, trad. Bert de Wit)

Ekzistas diversaj radio-stacioj kiuj elsendas en Esperanto

3ZZZ Radio
Ĉina Radio Internacia
Radio Frei
Kernpunkto

Muzaiko
Radio Havana Kubo
Varsovia Vento
Radio Vatikana

Diversmaniere vi povas aŭskulti elsendojn, ekzemple:
- aŭskulti rete: <http://esperanto-radio.com>
- aŭskulti per apo (nur Android): [Muzaiko](#)



Esperanto-radio
Muzaiko

Esperanto ŝildeto

Kiam en 2005 Esperanto Nederland festis la 100-jariĝon de nia movado, eblis aĉeti platan ŝildeton. Mi aĉetis ĝin dum la jarkunveno, se mi bone memoras en la kafpaŭzo ni ĝuis belan kaj bongustan torton. De tiam ĝi pendas ĉe nia dompordo kaj de temp' al tempo instigas homojn demandi pri ĝi.

La eterna demando: "Esperanto! Ĉu ĝi ekzistas ankoraŭ?"

Nun ĝi aspektas preskaŭ senkolora, ne plu kiel reklamo por nia lingvo kaj agado: Ĉu iu el la legantoj de Fenikso havas tian aŭ alian ŝildon por mi? Volonte mi pagos la kostojn!

Anneke Schouten-Buijs
055 5332923
klaasank@yahoo.com



Letero de Marc "Marko" Konijnenberg



Estimataj estraranoj de Esperanto Nederland, kaj kopie la Komitato de UEA,

Kun bedaŭro mi konstatis ke la komitato de UEA enhavas grandparte silentan "ŝafaron" kiu iele-trapele voĉdonas ĉu favore ĉu malfavore la proponojn.

Grava ekzemplo estas la buĝeto por 2021, kiu post tri prokrastoj estis lastmomente akceptita la 31-an de decembro; ĝi estis la sama buĝeto kiun la komitato malakceptis jam en aŭgusto. La reviziita budĝetpropono alvenis ne nur malfrue, sed ankaŭ nereviziita - malgraŭ ke tio eksplicite estis la komitata deziro.

Libera Folio relative akurate resumas la aferon, se vi interesiĝas.

La ĉefa malkonsento pri la budĝeto de 2021 estis la pensia aranĝo por la restantaj kvar oficistoj en la Centra Oficejo.

La Estraro silentis kiam temas pri la pensio-aranĝo de la oficistoj, malgraŭ la klara peto de la komitato ke la Estraro tion pridiskutu kun la oficistoj. Ne klaras ĉu konversacio kun la oficistoj entute okazis, malgraŭ eksplicita peto de komitatano Corsetti, kaj ĉiukaze neniu pri tio enestas la akceptitan budĝeton por 2021.

Samkiel ĉiuj respektindaj labordonantoj en Nederlando, UEA havis pensiprogramon por siaj oficistoj. Tamen ekde 2021 ne plu.

Tio ĉi laŭ samlandano Rob, mi kaj pluraj aliaj komitatanoj estas ne-akceptebla.

Vundas min la fakto ke UEA neglektos sian moralan respondecon kiel labordonanto, kaj tio ke la komitato akceptas budĝeton en kiu subite mankas pensian aranĝon por la oficistoj.

Laŭ mi Esperanto estu lingvo kiu celas moralecon kaj justecon, kaj UEA estu morala kaj justa labordonanto.

Ĉar UEA neglektas sian moralan devon, kaj la Komitato klare neglektas sian rolon, mi bedaŭrinde sentas min devigata forlasi la rolon de Komitatano A por Nederlando.

Mi povas ankoraŭ iom plu roli kiel komitatano A por Esperanto Nederland, sed mi petas vin rapide serĉi posteulon por mi.

Samideane,
Marko

Postskribe: Kiel flegisto, flegante maljunajn demenculojn mi ĉiukaze sentus la respondecon al la homoj kiujn mi flegas ne-vojaĝi al la UK de 2021, malgraŭ la (tro)optimismaj vortoj de la Estraro de UEA. Ĉiukaze necesintus anstataŭanto por la komitatkunsido de 2021.

640	Romano	Vladyka, Ladislav	Mi en li	pdf	238 paĝoj
641	Romano	Vojnic, Etelo Liliano	Ojstro	mht	paĝoj
642	Romano	Webb, Mary	Malbeno kara	pdf	251 paĝoj
643	Romano				
644	Por lerni				
645	Romano				
646	Novelo				
647	Artikolo				
648	Por lerni				
649	Por lerni				
650	Por lerni				
651	Novelo				
652	Rakonto				
653	Romano				
654	Romano				
655	Romano				
656	Artikolo				
657	Romano				
658	Romano				
659	Artikolo				
660	Artikolo				
661	Teatraĵo				
662	Romano				
663	Teatraĵo				
708	Rakonto				
709	Rakonto				
710	Por lerni				
711	Por lerni				
712	Romano				
713	Novelo				
714	Romano				
715	Rakonto				
716	Fabelo				
717	Poezio				
718	Fabelo				
719	Rakonto				
720	Por lerni	Benson, D-ro W.M.S.	Bensona universala esperanto metodo	pdf	560 paĝoj
721	Romano	Berkhof, Astrid	Alarmsonorilo	pdf	54 paĝoj
722	Rakonto	Berkovic, Jichak dov	Malpezaj pasxoj	mht	paĝoj

Kial mi havas 1100 bitlibrojn

Saluton, mia nomo estas **An Olijslagers** kaj mi volas klarigi al vi kial mi havas pli ol 1100 bitlibrojn.

Kiam mi eklernis Esperanton antaŭ 15 jaroj, mi komencis legi multe. Tiel mi lernis multe da vortoj, kaj ankaŭ la konstruadon de Esperantaj frazoj kaj esprimoj. Ĉar tiam mi havis malgrandajn infanojn, mia ŝranko estis plena de ludiloj. Ne restis loko por libroj. Do mi ne aĉetis librojn, sed serĉis en la retejo por trovi (senpagajn) librojn. Mi trovis multe da fabeloj de H. C. Andersen kaj de la fratoj Grimm. Plaĉis al mi komenci per tiuj libroj, ĉar mi ofte jam konis la rakonton kaj tio estis facila por lerni novan lingvon.

Poste mi vere komencis kolekti ĉiujn librojn kiujn mi povis trovi kaj kiuj valoris esti legataj. Kaj post 500 libroj, mi pensis: "Domaĝe ke ili estas legitaj nur de mi. Kial mi ne disponigos ilin por aliaj esperantistoj?" Do mi komencis fari retejon kaj rubriki la librojn. La libroj kiujn mi kolektis estis senpagaj, sed mi ne volis "publikigi" ilin. La aŭtoroj kaj eldonejoj ankoraŭ vendas ilin. Mi trovis jenan solvon: Publikigi nur liston, kaj se iu volas legi libron, li/ŝi povas peti la libron per retmesaĝo. Tiam mi sendas la libron private. (Pruntedoni librojn por legi ne estas krimo, ĉu ?)

En la komenco mi faris liston en Excel kaj eksportis la liston en XML-formaton. Tion mi povis uzi en mia PHP-retpaĝo. Poste mi faris datumbazon kaj tiel estas multe pli facile por aldoni novajn librojn. Jes, de tempo al tempo mi ankoraŭ aldonas novajn librojn.

Kie mi trovas la liston, vi demandas vin? En mia retejo: <https://olijslagers.info/Esperanto/libroj.php> Vi povas serĉi librojn kiujn vi volas legi kaj se vi alklakas la numeron, la retmesaĝo por sendi al mi aperas kun la bezonataj datumoj.

Mi jam deziras bonan legadon al vi. Mi atendas la retmesaĝojn ...

La marta sumoo

Sumoo estas japana tradicia lukto*. Ĉiun jaron okazas 6 konkursoj en neparaj monatoj: januaro, marto, majo, julio, septembro, kaj novembro. Unu konkurso daŭros 15 tagojn.

Esperanto-Sumoo estis elpensita por ke esperantistoj legu esperantajn librojn. Dum la tempo, kiam dikaj sumooistoj luktas en Japanio, ni esperantistoj legas esperantajn librojn. Antaŭ la aranĝo ni elektas libron, kiun ni legos kaj decidas

kiom da paĝoj ni legos ĉiutage. Se ni plenumas nian tagan taskon, ni havas unu venkon. Tiamaniere ni luktadas 15 tagojn. Sumooistoj en Japanio luktas kontraŭ aliaj luktistoj, sed ni esperantistoj luktas nur kontraŭ malfortoj de nia propra personeco.

La fama legoluktado "Sumoo" ekos la 14-an de marto por du semajnoj. Se vi apogas la Esperanto-kulturon, anoncu vian partoprenon al S-ro HORI Jasuo per horizonto@r.water.sannet.ne.jp indikante la titolon de via preferata libro kaj la nombron de la paĝoj legotaj ĉiutage. Sukceson!

Fonto: <http://www.esperanto-sumoo.pl/index.html>

*lukto = worstelen



POMEGO – Nova Rikolto

Kun danko mi ricevis ekzempleron de “PMEG 2020: Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko”, freŝdate reviziitan de Bertil Wennergren, kiu ankaŭ respondecas pri la novigota SAT-vortaro PIV. Kvalito garantiita ĉe la sveda akademiano.

En pluraj piednotoj ni legas foje fortan kritikon kontraŭ la aŭtoritata “Plena Analiza Gramatiko” (PAG, 4-a eldono 1980) de Kolomano Kalocsay kaj Gaston Waringhien. Plej ofte prave. Kaj malofte la Pomego mem ebligas almenaŭ dubeton.


Kritiko estas tradicia: Zamenhof mem montris la evidentajn malfortaĵojn de Volapuko, kaj al siaj kritikantoj reagis per la vere studindaj “Lingvaj Respondoj”. PAG mem (p. 10) en nur 8 okazoj konstatis modernigon de la lingvouzado post Zamenhof aŭ logikigis ĝin: “po” fariĝis adverbo anstataŭ prepozicio (“mi donas po tri pomojn” – do 3 al ĉiu, samkiel ‘ĉirkaŭ’ en “mi havas ĉirkaŭ mil librojn” – anstataŭ “mi havas egan plaston sakon ĉirkaŭ mil librojn”).

Permesu, ke mi lasu komparon de PMEG 2020 kun PMEG 2005 al “NGGE SCIIGAS”.

Aplaŭdinda estas la provo faciligi la fakvortojn: “rolvorteto” anstataŭ “prepozicio” k.s. Klara averto ne trouzi la akuzativon, kiam frazo komenciĝis per “Okazis” (*kongreson??), “Aperis” k.s. Nu, pri tio jam instruas “Gramatiko kun Ekzercoj” de Arjen Sjoerd de Vries kaj Roel Haveman. Entute ni trovas multajn “ne uzu”-konsilojn. Sed aliokaze Pomego permesas pli ol PAG/PIV: miljaro aŭ jarmilo: sambonaj!

Tre ĝojigis, ke en la “apudmeto” (bijstelling, apozicio) nun ĝusta estas “sian”: “ili renkontis s-ron Umo, sian instruiston”, kie la akuzativo ja klare indikas, ke la posedpronomo dependas de la predikato (gezegde) “renkontis”.

Ankaŭ tiu vorto “ĝusta” (aŭ “senerara”) anstataŭ *”korekta” fine trovis solrajton ĉe Bertil Wennergren. “Korekta” povas signifi nur “rilata al korektado” (korekta laboro, korekta skribilo). Li eĉ plurfrazo defendas la akademian akcepton de dukarektera radiko “falsa” kaj “falsi”. (La nederlanda “vals” ofte ne estas tradukebla per “falsa”: nek hundo nek kantado estas tiaj!) Mi miras, ĉar la latina procedo fari novan “intensan” aŭ “ripetan” verbon el la radikalo (radiko plus sufikso) trovebla en



participo liveras kaj falsa kaj falsi, kaj korekta kaj korekti. Sed decidu la Akademio: tiu devas elekti el la nuntempa praktiko tiujn formojn, kiuj ekregis. Ĉu mankoj? Mi ne trovis trakton de jardatoj kiel MDCCCLVII (1857). Vi jam trovas ke mankas du jaroj kaj la X: tiu ne apartenas al la Esperanta alfabeto, kaj PMEG ja eksplicas, ke ni uzu arabajn ciferojn.

Mi esperas, ke ĉi tiel mi plureklamis la verkon de Wennergren, sed cetere plusendas vin al NGGE SCIIGAS.

Rob Moerbeek.

Wat is POMEGO

Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko (PMEG, Nederlands: Volledige handleiding van de Esperantogrammatica) is een boek dat de Esperantogrammatica op een gemakkelijk te begrijpen manier uitlegt, voornamelijk geschreven door Bertilo Wennergren. Het is vooral gericht op gewone Esperantisten die de grammatica, de woordconstructie, de schrijfwijze en de uitspraak van het Esperanto willen bestuderen. PMEG is vooral een praktische gids en niet echt een theoretisch werk voor taalkundigen, in tegenstelling tot de Plena Analiza Gramatiko (Nederlands: Volledige analytische grammatica). In PMEG wordt het moderne en klassieke taalgebruik behandeld. Er zijn veel voorbeelden opgenomen uit het Fundamento en de werken van Zamenhof. De afkorting PMEG wordt door veel mensen uitgesproken als ‘pomego’ (een grote appel!).

La Pomego estas aĉetebla en papera formo: <https://pmeg.ikso.net>. Cetere la tuta enhavo estas legebla ankaŭ en interreto: <https://bertilow.com/pmeg/>

Esperanto gravas por la mondo

...ni devas eduki la publikon por kompreni kial Esperanto gravas por la mondo, kaj por ili persone. Ju pli ni sukcesos konsciigi landon pri tio, ke Esperanto estas unika instrumento por faciligi la interpopolan komprenon, des pli oni povos kompreni kaj akcepti, ke ni havas belan donacon al la mondo.

Ni devas kunlabori por trovi kiel vidigi tiun donacon. La homoj povos efektive akcepti, ke Esperanto estas unu el la plej gravaj iloj por la pacigo de la mondo kaj interkomprenigo de la mondo.

Ni havas tiel unikan instrumenton kiu faciligas egalecan komunikadon kiu ne baziĝas sur unu sola kulturo, unu sola politika reĝimo, unu sola maniero vidi la mondon.

Salutmesaĝo de prezidanto de UEA en AMO 71 Duncan Charters en Ĉinio

Komence de 2020 Federico Gobbo (prof. pri Interlingvistiko kaj Esperanto de la UvA) publikigis libron kun la titolo "Introduction to Interlinguistics", celante komencantajn studentojn. Ĝi klarigas kio estas interlingvistiko, traktas i.a. la planlingvojn Volapük kaj Esperanton kaj fine rigardas antaŭen al la estonteco de interlingvistiko.

Malfacilas enkonduki interlingvistikon per manlibro

De Federico Gobbo

Malofte neesperantlingva volumo altiras multe da atento de la verda gazetaro. Unu el ĉi tiuj raraj okazoj estas la anglalingva manlibro kiu enkondukas interlingvistikon publikigita komence de jaro 2020, hazarde ĝuste antaŭ la ekestiĝo de la mondskala pandemio kiun ni ĉiuj nun travivas.

Iom da monatoj poste aperis aliaj du enkondukaj manlibroj pri la sama temo. La duan manlibron pri interlingvistiko publikigis Davide Astori, asocia profesoro pri lingvistiko en la Universitato de Parmao, Italio*, kaj la trian publikigis Vera Barandovská-Frank, profesoro de Akademio Internacia de la Sciencoj**. Dum la dua estas en la itala, la tria estas en Esperanto. Se oni komparas la tri volumojn oni povas facile kompreni, ke estas diversaj interpretoj pri la konturoj de la fako kaj eĉ pli pri ĝia kerno. Eĉ la difino de planlingvo disde etnolingvo estas diskutata.

Tio signifas, ke nesperta leganto de iu aŭ de alia volumo povas havi tre diversan impreson pri interlingvistiko. Aparte gravas la lingva repertuaro: malsimile oni enkonduki interlingvistikon al

Esperanto-parolanto, ĉar Esperanto ja estas la ĉefa sukcesa rezulto interlingvistika – pri tio ja neniu disputas, eĉ ne homoj kiuj kontraŭas ĝin. Antaŭ ol decidi kion legi mi permesas konsili al la legantoj spekti per Jutubo mian prelegon pri la temo, kadre de VEKI 2020: *Ses difinoj serĉantaj fakon: interlingvistiko inter komuniko kaj fikcio****.

Mian anglalingvan volumon oni povas aĉeti PDFe kontraŭ unu eŭro – aŭ, pli multekoste, paperforme – per la retpaĝo kiun la eldonejo GRIN**** dediĉas al ĝi. Alia eblo estas senpage deŝuti la antaŭpresan version per la deponejo Academia.edu*****.

* Davide Astori: [Interlinguistica. Pianificazione, creatività, contatto.](#)

** Vera Barandovská-Frank: [Interlingvistiko. Enkonduko en la sciencon pri planlingvoj](#)

*** Prelego VEKI: <https://youtu.be/jZh5J3zzN9s>

**** Federico Gobbo: Introduction to Interlinguistics <https://www.grin.com/document/516591>

***** Antaŭpresa versio: https://www.academia.edu/41983002/Introduction_to_Interlinguistics_FINAL_DRAFT

Koninklijke Bibliotheek (KB)

De Koninklijke Bibliotheek (KB) is de nationale bibliotheek van Nederland, gevestigd in Den Haag. Zij verzamelt alles wat in en over Nederland verschijnt, van middeleeuwse literatuur tot aan publicaties van vandaag. Zo'n 7 miljoen publicaties zijn in de magazijnen opgeslagen, boeken, kranten en tijdschriften.

Fenikso wordt goed bewaard

Van ieder nummer van Fenikso wordt ook een fysiek exemplaar naar de KB gestuurd. Op die manier blijft Fenikso bewaard en kan het altijd weer gelezen worden. Vanaf dit nummer gaan we Fenikso ook digitaal naar de KB toesturen, zodat het ook digitaal opgevraagd kan worden.

De KB let goed op of alle nummers aankomen. Vorig jaar werd aan Ineke Emmelkamp gevraagd waar de nieuwste Fenikso bleef, toen we wat vertraging hadden!

Zelf materiaal uit de KB opvragen

Wil je opzoeken welke boeken en tijdschriften de KB heeft en deze lenen of inzien, dan kun je deze opzoeken: <https://opc-kb.oclc.org>

Fenikso kun je hierin snel vinden door te zoeken op het ISSN-nummer, het nummer dat voorin het blad staat: 1384-6515.



Kerstwensen van de KB.



Esperanto en scienco

Pretas 16 filmetoj.

Esperanto estas kreskanta lingvo kun multe da potenco, sed kvankam ĝi floras kiam temas pri socia agado aŭ lingvaj debatoj, scienco estas tereno, kiu ne sufiĉe estas esplorata. Kiel paŝo en la ĝusta direkto, ĉi tiu kanalo disvastigas videigitajn artikolojn de la blogo Scivolemo. Tiel la celo unua estas diversigi la materion, kiun la lingvo povas oferti. Nuntempe ni estas Frank, Karlos', Stefan kaj Siru, sed tio ne signifas ke nia teamo plenas. Ni daŭre serĉas samideanojn kiuj emas helpi per iliaj lertecoj. Ĉu vi volas? Kontakti nin! Ni estas profesie nek sciencistoj nek filmistoj. Tio signifas ke kritikoj kaj sugestoj ĉiam estas bonvenaj.

Ĝuu!

- La spektadon ĉe Youtube: tinyurl.com/1bdrn92c
* Dekstre klaku al: ABONU
- La legadon en <https://scivolemo.wordpress.com>



* Aŭ: <https://www.youtube.com/channel/UCJy1LAuTnZjrov6QFWsagug>

Oferto de libroj

En la lastaj numeroj de Fenikso mi publikigis titolojn de kelkaj libroj kiujn Esperanto Nederland ricevis el diversaj heredaĵoj. Hodiaŭ mi antaŭvidis ricevi kelkajn skatolojn kun diversaj libroj kaj esperantaĵoj. Pro la pandemio kaj la vintra situacio en la norda parto en Nederlando ĝi ne povis okazi.

Nun mi havas plurajn sufiĉe malnovajn librojn en kesto en mia koridoro. Mi metis nun ĉiujn librojn en liston. Temas pri 25 libroj. Mi volonte sendos al vi tiun ĉi liston kaj poste vi povas mem elekti kiujn librojn vi deziras ricevi (kontraŭ pago de sendokostoj). Vi petas, mi sendos!


Restas al mi demando: kion mi faros kun la libroj kiuj restas, librojn kiujn neniu deziras ricevi? Mia persona ideo: mi metus ilin en la paperujon! Kiu havas alian ideon?

Kaj en venonta Fenikso mi esperas meti denove liston de interesaj libroj. Ĝis venonta fojo!

Ineke Emmelkamp,
sekretario@esperanto-nederland.nl




Besta ABC Libro



Mi havas bonan amikon kies bogepatroj estis konataj geesperantistoj en Amsterdamo kaj fidelaj membroj de FLE. Ankaŭ mi konis ilin. La bopatrino, Fenny Spelt, eklernis la lingvon kiel infano kaj donace ricevis libreton Besta ABC en Esperanto. Ĉarma libreto (vidu enmetaĵon) de 8 paĝoj. Mi antaŭ kelkaj tagoj ricevis tiun libreton de mia amiko, kiu trovis ĝin inter la libroj de sia lastjare mortinta edzino.

Mi volonte donacos ĝin al iu samideano kiu volas lernigi Esperanton al sia(j) infano(j). Eble vi bonvolas publikigi tion en Fenikso? Interesiĝantoj povas sendi e-mesaĝon al mi. "Kiu unue venas, unue muelos"

Kees Ruig
Retadreso: k.ruig@telfort.nl





INK-konkurso

Alvoko de Akademio Literatura de Esperanto.

Interkultura Novelo-Konkurso (INK) estas konkurso organizata de Akademio Literatura de Esperanto kaj aŭspiciata de Universala Esperanto-Asocio, celanta instigi aktualan novelan kreadon de aŭtoroj el diversaj kulturoj. Sama temo, malsamaj vidpunktoj, malsamaj historioj...

La temo de la konkurso estis voĉdonita rete: "KOVIM-19: Kiel ĝi

ŝanĝis nin". Aŭtoroj estas nun invitataj verki novelojn pri ĉi tiu temo kaj sendi ilin per reta formularo antaŭ la 20-a de junio 2021.

Pensu: la nova koronaviruso, kiel ĝi ŝanĝis vian vivon aŭ la mondon? Per ĉi tiu temo, vi povas trovi inspiron por skribi fikcian rakonton okazantan en la pasinto (dum la unuaj – kelkfoje frenezaj – monatoj de la pandemio), nuntempe (kiam pandemio iĝis preskaŭ kutima afero de la vivo) aŭ en la estonto (post jaroj, jardekoj aŭ eĉ pli... kia estos nia mondo?)

La tekstoj havos maksimume 12 000 karaktrojn (proksimume 6 paĝoj). Ne estas minimuma longeco. Poste, interkultura ĵurio taksos la novelojn kaj anoncos gajnintojn dum la 107a Universala Kongreso de Universala Esperanto-Asocio en Montrealo, somere 2022. La aŭtoroj de la tri gajnintaj noveloj ricevos premion de 500, 300 kaj 200 eŭroj, respektive.

Finalistajn novelojn oni povos legi en rete publikigota novelaro.

Ĉu vi ŝatas literaturon, novelojn, novelkonkursojn, INK-on? Ni volas aŭdi pri vi!


Akademio Literatura de Esperanto

www.akademio-literatura.org

info@akademio-literatura.org

Oproep voor bijdragen

Elk lid van Esperanto Nederland houdt zich op zijn of haar eigen manier bezig met Esperanto, variërend van het bestuderen van de grammatica, het schrijven van gedichten of andere teksten, tot het ontmoeten van andere Esperantisten, fysiek of op sociale media. We roepen u op om uw ervaringen met ons te delen. Uw verhalen zijn meer dan welkom, zowel in het Esperanto als in het Nederlands. Stuur u ook foto's mee. Grammaticale fouten corrigeren we. Inkorten en andere aanpassingen doen we alleen in goed overleg met u. Wanneer u wilt, kunnen we ook een interview houden. Neemt u bij langere teksten eerst contact met ons op. Stuur uw bijdrage op naar: redakcio@esperanto-nederland.nl.





19 - 21 november 2021

Esperanto Studieweekend

Voor wie Als je nog nooit Esperanto hebt geleerd, of jouw Esperanto is nog niet zo goed als je zou willen, ben je van harte welkom. Er wordt op verschillende niveaus les gegeven. De nadruk ligt op het oefenen van het spreken in Esperanto in kleine groepen


Wanneer Het studieweekend vindt plaats op vrijdag 19 t/m zondag 21 november 2021.

Waar Natuurvriendenhuis Krikkenhaar, Krikkenhaar 11, 7627 PA Bornerbroek.

De **kosten** voor dit studieweekend bedragen € 85,- pp. (leden van Esperanto Nederland en NEJ of andere landelijke Esperanto-vereniging betalen € 75,- pp.) In de prijs zijn inbegrepen: lessen, het overige programma, overnachtingen, maaltijden, koffie en thee tussen de lessen.

De **deelnemersbijdrage** van deze bijeenkomst is laag. We willen iedereen een kans geven om deel te nemen. Wil je een extra financiële bijdrage leveren, geef dan aan op het aanmeldingsformulier met welk bedrag je de bijeenkomst wil steunen. Elke bijdrage is welkom.

Meer informatie en het aanmeldingsformulier staan op de website van Esperanto Nederland <https://esperanto-nederland.nl/ned/studieweekend/studieweekend.php>



Covid-19

Het geplande weekend van 5-7 maart 2021 hebben we vanwege COVID-19 geannuleerd. We zien geen mogelijkheid om het op een veilige manier te organiseren. Het gebouw is te klein als we rekening houden met de afstand van 1,5 m. Lesgeven op een veilige afstand is ook lastig. Jammer, maar het is niet anders.

Als we de bijeenkomst van november 2021 ook moeten annuleren i.v.m. covid-19, dan betalen we je aanbetaling terug!

Arjen-Sjoerd, Lilian en Ineke
studosemajnfino@esperanto-nederland.nl

PostNL

Port betaald
Port payé
Pays-Bas

Fenikso
26a Jarkolekto, n-ro 2
mart. - apr. 2021